

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Sten'ka Razin

*tradukita de Frieder Weigold*

1. De l' insulo, de la verda,  
Dum la tempo de la car',  
Naĝas vico da boatoj,  
La arme' de l' kozakar'.

2. Sur l'unua Sten'ka Razin.  
Oni gaja vidas lin.  
Feliĉega tiu tago!  
Li edziĝis kun princin'.

3. Ŝi mallevas la okulojn.  
Kvazaŭ inter viv' kaj mort'  
Ŝi aŭskultas en silento  
Al sincera, firma vort'.

4. Liaj viroj tamen grumblas:  
"Post nur unu nokto jam  
Faris ŝi lin mem virino.  
Li perfidas nin pro am'!"

5. Tion aŭdas kolerante  
La kozaka kapitan'.  
Kaj li kaptas la princinon,  
Per la forta, ega man'.

...

Дмитрий Николаевич Садовников,  
Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)

1. Из-за острова на стрежень,  
На простор речной волны,  
Выплывают расписные,  
Острогрудые челны.

2. На переднем Стенька Разин,  
Обнявшись, сидит с княжной,  
Свадьбу новую справляет,  
Сам веселый и хмельной.

3. А она, потушив очи,  
Ни жива и ни мертва,  
Молча слушает хмельные  
Атамановы слова.

4. Позади их слышен ропот:  
- Нас на бабу променял!  
Только ночь с ней провозилс  
Сам наутро бабой стал .

5. Этот ропот и насмешки  
Слышит грозный атаман,  
И могучею рукою  
Обнял персиянки стан.

...

6. Fulmas la okuloj duraj,  
Flame ŝtormas la koler'!  
Kaj eksonas lia voĉo  
Krudglacie kiel fer':

7. "Ion ajn, eĉ mian kapon  
Ja fordonus mi por vi!  
La feliĉon mi ja trovis.  
Ĉio estas ŝi por mi!

8. Volga, Volga, kara panjo,  
Ho rivera rusa vi!  
Kiam vidis vi oferon,  
kian nun fordonas mi?

9. Ke neniam ni kverelu  
Pro la persa belulin':  
Volga, Volga, kara panjo -  
La oferon - prenu ĝin!"

10. Kaj per ambaŭ fortaj manoj,  
Dum ektimas la princin' -  
Ve, deborde ŝin li puŝas! -  
Kaj la ondoj voras ŝin!

11. "Diabloj! Kial vi silentas?  
Dancu, kantu ja pro ŝi!  
Kaj eksonu la kantado,  
La fratara melodi'!"

...

6. Брови черные сошлись,  
Надвигается гроза.  
Буйной кровью налились  
Атамановы глаза.

7. "Ничего не пожалею,  
Буйну голову отдам!" —  
Раздается голос властный  
По окрестным берегам.

8. "Волга, Волга, мать родная,  
Волга, русская река,  
Не видала ты подарка  
От донского казака!

9. Чтобы не было раздора  
Между вольными людьми,  
Волга, Волга, мать родная,  
На, красавицу возьми!"

10. Мощным взмахом поднимает  
Он красавицу княжну  
И за борт ее бросает  
В набежавшую волну.

11. "Что ж вы, братцы, приуныли?  
Эй, ты, Филька, черт, пляши!  
Грянем песню удалую  
На помин ее души!.."

...

12. De l' insulo, de la verda,  
 Dum la tempo de la car',  
 Naĝas vico da boatoj,  
 La arme' de l' kozakar'.

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-478-928 (2009-10-30 16:18:33)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-10-09 tiun ĉi Esperantigon de la konata rusa kanto de s-ano Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim), dum kunveno de la Munkena Esperanto-grupo.*

12. Из-за острова на стрежень,  
 На простор речной волны,  
 Выплывают расписные  
 Острогрудые челны.

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poeto estas ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, \*1847 – †1883).*

*Arg-478-927 (2010-03-07 18:59:55)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la informojn sub <http://ru.wikipedia.org>, la ruslingva parto de Wikipedia. Informoj pri la kanto, la melodio kaj diversaj versioj de la kanto estas troveblaj en la retejo <http://a-pesni.golosa.info/popular20/izzaostrova.htm>.*